# Ĉinio, Japanio kaj insulo Tajvano

verkita de *Éric Bernard COFFINET* (ebcoffinet.fr)
la 18an de decembro 2025

La reago de la ĉinaj aŭtoritatoj kontraŭ la paroloj de la japana ĉefministrino *Sanae Takaichi* pri la insulo Tajvano enradikiĝas en "longdaŭra" historio, kiun oni devas koni por bone kompreni.

Dum la dua parto de la dek-naŭa jarcento, Ĉinio, Japanio kaj Koreio estis perforte devigitaj de la okcidentaj potencoj malfermi siajn landojn al la ekstera mondo kaj al la internacia komerco. La moderniĝo socia, scienca, industria kaj eduka de iliaj tradiciaj socioj feŭdismaj estis malfacila kaj suferiga.

Japanio fariĝis militarisma socio superregata de la imperiestro (Tenno-o), kiun japanoj konsideris kiel dian prafilon de la sundiino Amaterasu-o. Ĝi moderniĝis pli rapide kaj pli efike ol Koreio aŭ Ĉinio kaj per sinsekvaj militoj provis kolonii ilin kaj aliajn landojn por akiri krudaĵojn kaj nutraĵojn, kiujn japanoj ne sufiĉe posedis en sia lando.

Post milito kontraŭ Ĉinio (1894-1895) Japanio konkeris Koreion kaj la insulon Tajvano. Post milito kontraŭ Rusio (1904-1905) Japanio konfirmis sian influon super Koreio kaj Manĉurio kaj akiris parton de la insulo Saĥaleno. Post la unua mondmilito (1914-1918) Japanio kaptis ĉiujn koloniojn de Germanio en orienta Azio kaj Pacifiko. Post la rusa revolucio Japanio sendis trupojn al Siberio por provi okupacii ĝin sed malsukcesis. Dum la 1930aj jaroj Japanio invadis Ĉinion kaj kreis la pupan ŝtaton de Manĉukuo. Dum la dua mondmilito (1941-1945) Japanio invadis plurajn landojn de sudorienta Azio por krei "kunprosperan sferon de la granda orientazio". Fakte Japanio ne celis veran kunprosperon sed nur anstataŭi la occidentajn koloniistojn por imperiisme ekspluatadi kaj "japanigi" tiujn landojn kaj popolojn...

Tia situacio kompreneble vekis multajn ribelojn de la diversaj popoloj koloniitaj, kiujn senkompate subpremis Japanio. Ĉio ĉi ĉesis sekve de la plena malvenko de Japanio en 1945, sed persistas dolorigaj memoroj pri pasintaj kruelaĵoj kaj militkrimoj, kiujn Japanio malfacile agnoskas kaj ne kompensis. La "malvarma" milito, kies portempa "varmiĝo" (1950-1953) dividis ĝis nun Koreion, daŭre malhelpis la reamikiĝon de tiuj landoj kun Japanio.

Ĉinio kaj Japanio tamen repaciĝis en 1972, sed la reago de Ĉinio kontraŭ la ĵusaj vortoj de la japana ĉefministrino *Sanae Takaichi* pri la insulo Tajvano indikas, ke fajro daŭre bruletas sub cindroj ĉar Ĉinio neniam toleros revekiĝon de Japanio tiel naciisma, militarisma kaj agresema kiel antaŭe...